

EKRIGARDO AL BUDHISMO

ELDONO MEMORE AL LA
MAHA ĴAJANTI
2500 B.E.

Por la
WORLD INSTITUTION OF BUDDHIST CULTURE
MANDALAY (BIRMO)

tradukas el la angllingva originalo
“A GLIMPSE OF BUDDHISM”

anoj de
BUDHANA LIGO ESPERANTISTA

Ni estas dankemaj al la Ven. C. Njanasatta (Cejlono), kiu inspiris sian amikon D-ron R. L. Soni, la Fondinton Ĉef-Direktoron de *World Institute of Buddhist Culture*, Mandalay (Birmo), al produkto de literaturaĵo pri Budhismo en Esperanto.

Ni ankaŭ ĝojas ke, laŭ propono de nia prezidanto Rev. R. Petri kaj nia sekretariino F-ino M. E. Bowden, *World Institute of Buddhist Culture*, Mandalay (Birmo) konsentis pagi la koston de la preso de du mil ekzempleroj de eldono en Esperanto de la verko de D-ro Soni "*A Glimpse of Buddhism.*" La tutan koston £81 pagis per personaj donacoj D-ro Soni kaj sia Direktoro de Informado Daw Noreen Iona, al tiuj ambaŭ ni esprimas nian dankemon.

Ni ankaŭ dankas niajn anojn, kiuj kunlaboris en la traduko, la preparo de la teksto, kaj aliaj taskoj. Speciale ni dankas la prezidanton kaj S-ron G. H. Yoxon, kiuj faris la plej gravajn taskojn. Ni estas certaj, ke tiu ĉi traduko servos la movadon Budhisman kaj la pli bonan komprenon inter Budhanoj kaj la mondo ĝenerala.

BUDHANA LIGO ESPERANTISTA.

"Clarach",
Abbey Drive, Gronant,
Prestatyn, North Wales,
Britujo.

EKRIGARDO AL BUDHISMO

ESTANTE

MALLONGA RAKONTO PRI KELKAJ FUNDAMENTAJ
DOKTRINOJ DE BUDHISMO, KUNE KUN OBSERVOJ
PRI LA INFLUO DE LA INSTRUOJ SUR LA
HOMARO EN LA PASINTECO KAJ ILIAJ
IMPLIKOJ AL LA HODIAŬA KAJ
LA MORGAŬA MONDO.

DE

D-RO R. L. SONI, M.B., B.S., F.R.H.S., F.Z.S., ktp.

KAJ

ANTAŬPAROLO

DE

LA RESPEKTINDA LOKANATHA BIKŜUO,
La Monda Misio por Budhismo.

TRADUKITA EN ESPERANTO

DE

MEMBROJ DE LA BUDHANA LIGO ESPERANTISTA

INSPIRITA

DE

LA PREZIDANTO, REV. R. PETRI (BIKŜUO ANURUDDHA).

Prezo: Naŭ pecoj

ĜENERALA INFORMO

La Instituto de Budhisma Kulturo, Mandalay (Birmo) havas, kiel unu el siaj agadoj la eldonon de serio de pamfletoj pri Budhismo diverslingvaj por disvastigi la scion pri Budhismaj temoj.

Unu el la celoj de la Instituto estas helpi al pli bona kompreno pri Budhismo inter Budhanoj. Alia estas, prezenti Budhismajn temojn laŭ iliaj kulturaj kaj praktikaj signifoj al la mondo ĝenerala. Ĉar la lasta havas, kiel esencan korolarion, la kreskigon de harmonio inter diversaj grupoj, sektaj, kontraŭ-religiaj kaj diskutebaj temoj ne estos akceptataj, krom sur nepre objektiva bazo.

Kelkaj serioj estas en la programo de eldonado, kelkaj plej gravaj estas*:

1. 'Popular pamphlets' serio ('Popularaj Tezoj').
2. 'Serious Thought' serio ('Serioza Pensado').
3. 'Children lessons' serio ('Lecionoj por Infanoj').
4. 'Topical subjects' serio ('Aktualaj Temoj').
5. 'Social Service' serio ('Socia Servado').
6. 'Dhamma-duta' serio ('Darma-servado').
7. 'Biographical' serio ('Biografia').
8. 'Buddhist Fine Arts' serio (Budhismaj Belartoj).
9. 'World-needs' serio ('Mond-bezonoj').
10. 'Self-culture' serio ('Mem-kulturo').
11. 'Scriptural Text' serio ('Tekstoj el Kanonaj Skribaĵoj').
12. 'Local Interest' serio ('De Intereso Ĉi-loka').

*Noto de trad: ankoraŭ ne haveblaj en Esperanto

Tiuj, kiuj volas ĝisdate informiĝi pri la diversaj eldonaĵoj de la Instituto konsilinde sin enregistrigu ĉe la Instituto.

Donacoj estas akceptataj, kaj ĉi tiuj estos reciproke repagotaj per libroj. La ricevo de novaj sugestoj estos danke reavizita.

DR. R. L. SONI,
Director-in-chief,
Institute of Buddhist Culture,
Soni Building,
Mandalay (Burma).

"NAMO TASSA BHAGAVATO ARAHATO
SAMMA-SAM-BUDDHASSA!"

ANTAŬPAROLO

Kiam kuracisto vidas pacienton, li unue sin konvinkas, ke la paciento estas malsana, tiam li diagnozas la kazon (eltrovas la kaŭzon), preskribas la kuracilon (forigas la kaŭzon), kaj la paciento estas kuracata. Simile, la Sinjoro Budho, la plej Granda Spirita Kuracisto de la Mondo, vidis ke la mondo estas malsana pro Suferado; Li vidis, ke Avido estas la kaŭzo de Suferado; Li vidis, ke Suferado estas forigata per la detruo de Avido; kaj Li preskribis la Kuracilon: Avido estas detruata per sekvado de la Nobla Okera Vojo de Prava Scio, Prava Celo, Prava Parolo, Prava Konduto, Prava Okupo, Prava Klopodo, Prava Pripenso, Prava Koncentriĝo. Tiuj estas la Kvar Noblaj Verroj, la Kvar Kolonoj de Budhismo.

Budhismo estas la Religio de la Senlima Ama Bonkoreco de Mem-rezigno. Ni bezonas la ANTIKVAN BUDHISMON, la Budhismon de Forta Fervoreco. La pura nediluita Budhismo de Antikva Tempo estis elfosita de ni en 1933 kiam ni komencis nian Unuan Grandan Ekspedicion! Nia Celo estas savi la Mondon per La Renaskiĝo de Budhismo!

Kiam nia Unua Granda Ekspedico atingis *Paungde*, D-ro R. L. Soni, *Punjabi* kuracisto, venis al mi en unu vespero kun kelkaj demandoj. Li venis responde al invito mia por tut-nokta neformala konferenco. Estis vere glora nokto; niaj volontuloj ripozis sub la arboj, dum mi sidis sur seĝo sub Bodhi-Arbo kune kun D-ro Soni sur mato ĉe miaj piedoj. Mi

diris al D-ro Soni: “Ni restos dum la tuta nokto sub ĉi tiu Bodhi-Arbo. Iluminiĝo venu al ni kiel Ĝi venis al nia Sinjoro Budho sub la Bodhi-Arbo!” Mi estis ĵus reveninta post livero de longa prediko pri vegetarismo; kaj krom tio mi suferis de severa malvarmumo; tamen pro Eterna Vero kaj Kompato mi ĝoje restadis dum la nokto respondante al la multnombraj demandoj de D-ro Soni pri filozofio kaj psikologio.

La suno jam alte leviĝis en la ĉielo kiam mi ĉesis paroli. Tia Paco kaj Trankvilo estis en la vizaĝo de D-ro Soni, kia estis rebrilo de la Nirvano kiun Nia Sinjoro Budho atingis sub la Bodhi Arbo antaŭ 2,500 jaroj. D-ro Soni rompis la Silenton dirante: “Mi ricevis multe da Spirita Nutro de vi, kaj nun mi devas peni digesti kaj asimiligi ĝin per Meditado kaj per legado de Libroj pri Budhismo”.

Mia malvarmumo nun bezonis kuracistan prizorgon; kaj, dum Dr. Soni donis al mi la necesan kuracadon, mi diris al li: “Mi penis sanigi viajn Kvar Mensajn Elementojn (*Khandas*) kaj nun vi penas sanigi miajn Fizikajn Elementojn (*Rupa Khandas*).” Li respondis: “Jes, sed via Servo estas senlime pli granda ol la mia.”

De *Paungde* mi gvidis la ekspedicion al *Prome*. La procesio tra *Prome* estis grandioza. Ĉiuj en *Prome* eliris por vidi la spektaklon. Ŝajnis kvazaŭ la Gloraj Tagoj de Antikva Tempo revenis. La Religia entuziasmo estis plena ĝis superfluo. Ni estis majeste eskortataj al la Monaĥejo kaj tie ni ripozis sub la arboj kiel kutime.

La plej grava okazaĵo ĉe *Prome*, dum nia kvar-taga restado tie, estis la tutnokta Religia Konferenco kun D-ro Soni el *Paungde* kaj liaj du amikoj el *Prome*. D-ro Soni jam pasigis la

tutan semajnon en Meditado pri la “Nenio”, kaj tiel perdis kvar funtojn de sia pezo. Kelkaj duboj ekleviĝis dum la meditado pri “Nulo” kaj li veturis vagonare al *Prome* por forigi ilin.

La nokto forpasis en glorindaj filozofiaj flugoj ĝis la tagiĝo. Kiam la Suno leviĝis, la duboj de D-ro Soni kaj liaj amikoj jam dispeliĝis.

D-ro Soni estas mia unua grava konvertito. Li ne restis neaktivo post la konverto. Li tuj eklegis librojn pri Budhismo kaj pasigis sian liberan tempon en Meditado. Ĉirkaŭ ses monatojn post nia renkontiĝo, li sendis al mi bonegan traktaton pri Budhismo kiun li legis antaŭ la *Paungde* Literatura Societo. Ĝi estas majstraĵo kiam oni konsideras kiel rapide li komprenis la fundamentojn de Budhismo. Ĉi tiu estis lia unua traktato pri Budhismo kaj, en reviziita formo, ĝi estas enhavata en ĉi tiu Libreto lia; zorgema ekzameno montros kiel plena estis lia konvertiĝo. Kiel rezulto de la granda Merito kiun li gajnis pro la verko de ĉi tiu Libro, estu liaj Plej Altaj Aspiroj fine plenumataj kaj li baldaŭ atingu Superegan Nirvanon!

LOKANATHA

NOTO DE LA AŬTORO

La enhavo de ĉi tiu pamfleto estas la reviziita formo de traktato, "*My Conception of Buddhism*" — (Mia Koncepto pri Budhismo) legita antaŭ la *Paungde-Literatura Societo* (Birmo) en la jaro 1933, kaj kiu aperis kiel ĉapitro en "*Buddhism, My Conception of it*" eldonita frue en la jaro 1945.

Ĉi tiu pamfleto, destinata por pli vasta publikigo, estas mallonga enkonduko proponata al la afero-plena leganto, neinformata pri la enhavo kaj potencoj de Budhismo. Ĝi donas nur ekvidon de tio, kio estas la Darmono (Doktrino), kaj kion ĝi povas fari por antaŭenigi la bonfarton de la homaro. Se ĝi interesigas iujn legantojn por havi detalan informon pri la temo, ili plej bone sinturnu al iuj el la rekonitaj verkoj pri Budhismo.

La aŭtoro estas dankema al verkistoj, ĉerpaĵoj el kies verkoj estas uzataj en ĉi tiu pamfleto: kie ajn citataj tiuj estas montrataj per citiloj. Li estas aparte dankema al sia estimata *Guru* (Instruisto), la Respektinda Lokanatha, la Mond-Budhismo Misiisto, kiu tre afable honoris ĉi tiun libreton per sia ĉarma antaŭparolo.

R. L. SONI.

The Soni Hospital,
Mandalay (Burma).

Antaŭparolo de la Respektinda Lokanatha
 Noto de la Aŭtoro

Ekrigardo al Budhismo

I.	Homaj Malegalecoj	11
II.	La Kaŭzo	12
III.	La Homa Personeco.....	13
IV.	La Fenomeno Morto	15
V.	Karmo	16
VI.	La Veroj.....	18
VII.	La Vojo	20
VIII.	Mem-Kulturo.....	23
IX.	La Vivo-vojaĝo	24
X.	La Kodo de Etiko	26
XI.	La Vojo al Perfektiĝo.....	29
XII.	La Budhisma Idealo de Saviĝo	30
XIII.	La Budhisma Triuno kaj Adoro.....	33
XIV.	La Misia Vervo.....	35
XV.	Religio kontraŭ Darmo	37
XVI.	Budhanaj Atingoj	38
XVII.	La Mondo Hodiaŭa	39
XVIII.	Kion la Mondo Bezonas	41
XIX.	La Mesaĝo de Lumo	44
XX.	La Espero de la Mondo	46

EKRIGARDO AL BUDHISMO

(Titolo de la angla originalo —
“A Glimpse of Buddhism”) de Dr. R. L. Soni

1. Homaj Malegalecoj

Ni komencu per ordinara observo. En la ĉiutaga vivo ni vidas, ke eĉ du personoj ne estas la samaj. Unu malsimilas la alian laŭ unu aŭ alia maniero. Ni malsimilas laŭ nia naskiĝo, ni malsimilas laŭ nia ĉiutaga vivado, ni malsimilas ĉe la morto: ni malsimilas entute kaj ni malsimilas detale. Ni ne nur malsimilas laŭ nia fizika formo, sed ankaŭ laŭ nia mensa komponiĝo kaj socia konduto. Ekonomiaj malegalecoj kaj malegalaj okazoj por kultura kaj eduka disvolviĝo kaj socia interrilato kontribuas esence al ĉi tiuj diferencoj.

Unu estas naskita, kiel oni diras, kun arĝenta kulero en la buŝo, alia en malriĉeco: unu naĝas en riĉegeco kaj pasigas siajn tagojn en lukso, alia frontas malsaton, malsanon aŭ aliajn mizerojn je ĉiu paŝo; plezuro atendas la postulojn de unu, dum malĝojo kaj larmoj estas la sorto de alia; unu estas benata pro afablaj parencoj kaj veraj amikoj, dum alia estas soleca forlasitulo; unu frato fariĝas eminentulo aŭ okupas respondecan postenon en la socio, dum alia deĵoras en pli modesta rango en la vivo. Ja por unu, vivo estas plezuro-rondo, por alia ĝi estas nenio krom mizero.

Transpontigante tiujn du ekstrecojn estas miriadoj da gradoj, pasante de kontento ĝis sufero.

Memevidente, la unua demando kiu sin prezentas al la homa menso estas: “Kial ĉio ĉi estas tiel? Kial ekzistas ĉi tiaj malegalecoj? Ĉu ili estas la kapricoj de la naturo, aŭ ĉu ili estas la esprimoj de reguligita fenomeno? Ĉi tiuj estas demandoj, eble samaĝaj kiel la homaro mem, kaj ili okupis la homan inteligentecon de post nememorebla tempo. La diversaj provitaj solvoj fariĝis la nukleoj de diversaj religioj. La religioj solvis la enigmon laŭ sia propra maniero kaj en taŭga tempo la Scienco enpaŝis kun siaj teorioj pri la temo.

2. *La Kaŭzo*

Per atentema observado oni konstatas, ke la Universo kiun ni perceptas, kun ĉiuj ĝiaj diversajoj, funkcias laŭ definitiva plano kaj kondiĉate de definitivaj Leĝoj konataj aŭ nekonataj. Ĉio estas atribuebla al kaŭzo. Ni perceptas ke, en la granda laboratorio de la Naturo, nenio leviĝas sen rilatanta kaŭzo: rezultoj sekvas kaŭzojn laŭ perfekta reguleco. Oni rimarkas ke tio estas esenca en la Naturo, ne nur en la fizika sed en la morala mondo. Fizika rezulto devas havi konforman kaŭzon, same kiel bona morala rezulto havas bonvolan originon. Tiu ĉi estas Leĝo — La Leĝo de Kaŭzo kaj Rezulto — kiun la Sinjoro Budho malkovris dum profunda meditado sub la fama Bodhi-arbo apud *Buddhagaya* en Hindujo antaŭ 2500 jaroj. Ĉi tiu estas

Leĝo akceptata egale de kaj Scienco kaj Budhismo. Sed la Scienco kuniras paŝon ĉe paŝo kun la Religio nur ĝis limigita grado, preter kiu ili ambaŭ tenas konfliktantajn vidpunktojn. Je la provo analizi la demandon pri la maniero de transiĝo de rezultoj el unu vivo en alian, ili diverĝas. Scienco kredas pri heredebila transiĝo, dum Budhismo postulas la doktrinon de individua Karmo. Ambaŭ havas siajn subtenantojn kaj ambaŭ havas siajn por-kaj-kontraŭ-dirojn. Je la nuna stato de scienca scio, efektive estas malfacile akordigi ĉi tiujn du konfliktantajn teoriojn. La afero estas eĉ pli komplikigata pro tio, ke ĉiu religio havas sian propran doktrinon pri la temo. Sed, ĉar la kompara teologio estas preter la celo kaj amplekso de ĉi tiu traktato, ni devas lasi la konsideron de Scienco kaj aliaj Religioj kaj antaŭeniri al kompreno de la signifo de la Budhisma teorio de Karmo.

3. La Homa Personeco

La homa fiziologio kaj psikologio instruas nin, ke homa estaĵo estas mensa unuo vestita per alte evoluita fizika korpo. La mondo, ja la tuta universo, formas la ĉirkaŭaĵon de tiu unuo. La ĉirkaŭaĵoj agas sur la homan menson kaj la menso reagis al ili. La ago portas reagon kaj lasas impreson en la menso: ĉi tiuj impresoj per postaj agoj kaj reagoj sumigas kaj formas nian sperton. Pensado mem estas rezulto de nia pasinta amaso da spertoj kaj estas sufiĉe

kondiĉata de niaj nunaj ĉirkaŭaĵoj. La sumigitaj spertoj donas al ni la niajn Sankharojn* aŭ inkliojn, kiuj modifiĝas malpliigas aŭ pliiĝas laŭ la maniero de, kaj forteco de, niaj postaj agoj, aŭ fizikaj aŭ mensaj. Tio estas la kialo pro kiu Budhismo forĵetas kaj kondamnas letargion kaj mallaboremon, kaj forte rekomendas persistemon en bonkoraj agoj. Ĝi estas alvoko al Ago — intensa kaj nobla, fizika kaj mensa: ja vere; ĝi estas Scienco de aktivecoj, instruanta regadon kaj finfinan neniigon de niaj Sankharoj.

Ni, ekkomprenu, je ĉi tiu stadio, la Budhisman analizon de la homa personeco. “Ĉi tiu 'MI' estas fasko de *Khandhoj*† produktita de avido enradikita en Nescio.”

La Kvin *Khandhoj* estas: —

1. *Rupakhandho* — Nia fizika korpo formita de kvar *Bhütoj* aŭ elementoj — solidoj, fluidoj, gasoj kaj energio.
2. *Vedanākhandho* — Niaj sentoj.
3. *Saññākhandho* — Niaj perceptoj.
4. *Sankhārakhandho* — Niaj inklioj aŭ ideoj.
5. *Viññānakhandho* — Nia konscio aŭ ekkono.

Tiel ke la unua *Khandho* signifas la fizikan korpon, la aliaj kvar estas kutime grupigitaj kaj kune nomataj “La *Namo*” aŭ la mensa akompanaĵo. Ĉiuj ĉi formas ĉi tiun 'MI' kaj 'VI' kaj 'LI', kaj, dum ni movas de la unua ĝis la lasta *Khandho*, ni pasas de pli krudaj al pli malkrudaj evidentaĵoj. Ĉiuj niaj

* Sankharo (noto al la Esperanto-traduko): mensa efektiviĝo de enformaj tendencoj.

† *Khandhoj* (noto al la Esperanto-traduko): komponaĵoj; kompleksa grupo de elementoj.

agoj, sentoj, perceptoj kaj inklinoj impresiĝas sur la *Viññānakhandho*. Ĉio kion ni faras, parolas aŭ pensas estas tie, konscie aŭ subkonscie: efektive ĉi tiu 'MI' estas projekcio kaj pli kruda evidentiĝo de ĉi tiu *Viññāno*. *Viññāno* estas la rezervejo de individua Karmo aŭ la tuta impresaro. Dum kelkaj el tiuj ĉi impresoj estas en aktiva evidentiĝo, aliaj restas dormantaj tiutempe. Ĉiuj ĉi impresoj de pasintaj agoj kune prenataj formas la individuon. Ĉar la tuto, pro la senĉesa aldonado kaj deprenado kaŭzataj de novaj impresoj, rezulte de novaj agoj, estas en stato flueca, la individuo necese estas malkonstanta objekto kaj nedaŭra unuo. Persono, tial, estas esence amaso da agoj kaj ties rezultoj. Vere, ne estas Aganto sed nur agoj farataj.

4. *La Fenomeno Morto*

Je la morto la korpo dispeciĝas kaj disfalas; sentoj, perceptoj kaj inklinoj malaperas en *Viññānon* kiu mem envolvas en tiun subtilan potencon kiu restas, kaj kiu estas nomata Karmo. Tiu ĉi Karma-Forto, kiu konservas la tutan memoron — memoron de ĉio farita, bona aŭ malbona, ekflugas same kiel radio-mesaĝo el la mortinta korpo, kaj serĉas taŭgan fizikan Ricevanton, ie en la universo, jam en harmonio kun ĝiaj vibroj, en la formo de ĵusa ekgravediĝo en la utero de iu patrino. Tie ĝi evoluadas, kreskadas kaj projekcias la kvin *Khandhojn*, ĝis ĝi finfine liveriĝas kiel tuta korpo je la naskiĝo. Ĉi tiu nova korpo estas “ne la sama, nek

alia” — “ne la sama” ĉar la korpa materio estas nove provizata, “tamen la sama” pro la aktivo de Karmo, kiun ĝi kunportis el pasintaj kontoj.

La Morto ordinare ne estas finpunkto al onies vivado. Ĝi estas nur mallonga halto en la longa vojaĝo, same kiel estas komo en frazo. Fakte, ne estas efektiva halto aŭ rompo; la daŭrigo estas tenata per la delikata, sed forta fadeno de Karmo-Forto. Oni movas kvazaŭ el unu ĉambro en alian, en la konstruaĵo de la vivo, tra kuniga aperturo. Sed, dum la ago, la konscia memoro de la pasinteco ordinare estas forigita. Ĉi tiel estas pli bone, alie koncentriĝo pri aktualaj problemoj necesaj pro la novaj ĉirkaŭaĵoj ne estus ebla, kaj plua evoluo de la individuo estus serioze endanĝerigata.

5. *Karmo*

Kvankam konscie ne-aganta, subkonscie la pasinteco daŭre direktas la tendencojn dum la vivo. Karmojam-en-la-faro tamen, estas volonta ago, kiu, kvankam ĝis certa grado kondiĉata de la pasinteco, estas efektive determinata dum la nuntempo per la libera volo de la individuo. Tial la nuntempo estas ne nur la heredanto de la pasinteco sed ankaŭ la kreanto de la estonteco. Ĉi tiel, la pasinteco, nuntempo kaj la estonteco, estas kunligataj de la Leĝo de Kaŭzo kaj Rezulto.

De naskiĝo al naskiĝo la grupo de la kvin *Khandhoj*, la psiko-fizika kombinaĵo formanta personecon, estas okupata

per la farado de volontaj agoj: ĝi daŭre spertas doloron kaj plezuron, kontenton kaj malkontenton, kaj la amaso da impresoj kiu restas post aldonoj kaj fordonoj estas, laŭ Budhisma filozofio, nomata la Karmo de la individuo je tiu aparta momento. Ĉi tiu mallonge estas la Budhisma Doktrino de Karmo.

Karmo ne estas Sorto aŭ ŝanco, nek estas ĝi pasiva. Oni povas nomi Budhismon pasiva, pro tio ke ĝi avertas nin ne fari malbonon, sed estas sciinde ke Budhismo ankaŭ admonas ke ni estu pozitive bona. Ĝi, kiel supre dirite, instigas al vivo de agado kaj estas la doktrino de streba, senĉesa aktiveco por noblaj idealoj. Eĉ li kiu estas nun bona homo ne povas resti kontenta pro sia boneco ĉar li ne povas eskapi la fruktojn de sia pasinta malbona Karmo, kvankam kiel rezulto de faroj de speciala merito li povas gajni unujn avantaĝojn mediajn, kiuj povas helpi al li porti tiujn rezultojn. Estas tial, ke Budhano ĉiam penas helpi al sia pli alta evoluo kaj, krom la praktikado de ĉiama vigleco, li devas esti ankaŭ strebe diligenta.

Karmo estas la rezulto de la funkcio de du leĝoj. Unu estas la Leĝo de Kaŭzo kaj Rezulto, kaj la alia estas la Leĝo de Kontraŭecoj. La unua instruas, “kiel ni semas, tiel ni rikoltos, pli-malpli frue, ĉi tie aŭ poste”: la alia montras kiel ni povas senpovigi malbonan Karmon per bona. Post tiaj alĝustigoj, kia ajn Karmo restas, tio estas la Karmo je nia kredito. Estas ĉi tiu saldo de Karmo kiu decidas nian naskiĝon. Tiel de naskiĝo al morto kaj de morto al renaskiĝo la vojaĝo daŭradas. Sed,

Tra la Naskiĝo, Vivo, kaj la Morto,

Plezure, aŭ malsane, aŭ malĝoje,
Nur ripetiĝas krom Dolor' nenio,
Hodiaŭ, morgaŭ, foje kaj refoje.

Alivorte vivado estas esence mizero. Ĝi estas *Dukkha*[‡] — ripetado de *Dukkha*. Ĝia kaŭzo estas Karmo. Ĉu ne troviĝas elirejo el ĉi tiu Mizero?

Tiu ĉi kondukas nin al la Kvar Noblaj Veroj — la kvar Juveloj de Budhisma Filozofio, la kvar Lumoj, kiuj povas liberigi nin el la malvirtaj ombroj de la vivo.

6. La Veroj

La celo de la vivo estas senpovigi Karmon per Superega Scio. Tiu procedo povas daŭri momenton aŭ centjarojn. Tiu ĉi Superega Scio troviĝas en la Kvar Grandaj Veroj.

La mondo kiel ni vidas ĝin ĉirkaŭ ni, kun ĝiaj plezuroj, scenoj, belo kaj tentoj, estas loko de senĉesa ŝanĝo. La Vivo estas kondiĉata de malkonstanteco. Ĉiuj ĉi tiuj, gojo, sano kaj beleco finas en sufero, malsano kaj malbeleco. Senĉesa ŝanĝo markas ĉi tiun ekziston. Kia vera plezuro povas esti, kiam oni scias ke ĝi ĉio estas portempa, pasanta fazo, iluzia? Ne mirinde estas, do, ke nia esto estas senĉese en stato malkontenta: nia fizika korpo, niaj sentoj, perceptoj, inklinoj kaj konoj ĝenerale estas en malkontenta, malsana stato. Vere, vivo estas malsano de la kvin *Khandhoj*. Ĉar ĉiuj

[‡] *Dukkha* (noto al la Esperanto-traduko): sufero, en la plej larga senco.

komponitaĵoj estas emaj al ŝanĝo, la tendenco de vivo mem estas malkontento aŭ suferado. Kian veran pacon oni povas havi kun ĉi tiu malkontento, tiu ĉi neevitebla suferado?

Plue, kio estas la kaŭzo de ĉi tiu malkontento, tiu ĉi mond-*Dukkha*?

La Rezulto devas havi sian Kaŭzon: La Rezulto, oni povas diri, estas Kaŭzo en alia formo. Tial ni serĉu la Kaŭzon en la Rezulto. Aŭ *Dukkha* kaŝita, aŭ *Dukkha* evidenta, kia ajn ĝia formo, ĉu ŝajne agrabla, ĉu evidente dolora, per analiza studo ĝi estas kontrole sekvebla al unu Radiko — Avido, la deziro asociiĝi kun ĉio, kion ni amas kaj disiĝi de ĉio, kion ni malamas. Iuj pasie amas riĉaĵojn, iuj parencojn kaj amikojn, kaj iuj aliajn materiaĵojn: iuj avidas famon kaj iuj avidegas postenojn. Ĉiuj ĉi emoj kaj egoismaj avidoj kutime kondukas eventuale al malsukceso aŭ seniluziiĝo, kiu foje estas milda sed foje intensa. Egoismaj emoj kaj Avidoj estas efektive la Kaŭzo de ĉiu afliktiĝo, sufero, zorgo, agito kaj mizero, fakte de ĉia *Dukkho*.

Sekve, kiel venki ĉi tiun "*Dukkhon*"? Por neniigi la rezulton oni devas neniigi la kaŭzon; tial por venki la "*Dukkhon*", ni devas superregi egoismajn avidojn. Tio estas logika konkludo.

Plue, kiel venki ĉi tiujn avidojn? Jen la Sinjoro Budho elmontras Sian Preskribon, la Kvar Grandajn Verojn, la Noblan Okeran Vojon; la ok paŝoj gvidas nin el egoismaj emoj al senegoisma servo, el nescio al saĝeco.

7. *La Vojo*

La vojaĝo al superega saĝeco estas longa kaj penega: ĝi bezonas kuraĝon, decidemon, energion, paciencon, bonvolemon kaj senĉesan mensan kaj fizikan aktivecon.

Unue, oni devas havi Pravan Scion aŭ Pravajn Vidpunktojn aŭ Pravan Direkton de la Vido. Estas la Prava Kredo kiu formas la pravan fundamenton kaj ni ĉiuj bone scias, kion Prava Scio signifas en Budhismo. Ĝi estas la scio pri la Kvar Noblaj Veroj, enhavantaj la Noblan Okeran Vojon, la Leĝon de Kaŭzo kaj Rezulto kaj la Tri *Lakkhanoj* aŭ ecoj de ekzistado, nome *Anicca*, *Dukkha*, kaj *Anatta*, t.e. malkonstanteco, malkontenteco kaj nerealeco. Ĉio, kio estas logika estas ankaŭ Prava Scio: fakte Budhismo fervore subtenas racionalismon. La Budho ankaŭ instruas al ni kompreni samtempe senĉesan ŝanĝon en fenomeno kaj ties subjektivaj kaj objektivaj evidentajoj: efektive ni estas ordonataj percepti en la Naturo principojn eterne realajn kaj “vidi negarnitajn faktojn malantaŭ la vestaĵoj de hipotezo, kiu obskuras la Veron”.

Prava Scio inspiras Pravajn Pensojn kaj aspirojn, pensojn de ama-bonkoreco kaj de rezigno pri egoismaj interesoj kaj aspirojn al senegoisma servado.

“Ĉio kio ni estas, estas la rezulto de tio kion ni pensis: ĝia fundamento estas niaj pensoj, ĝi konsistas el niaj pensoj”, estas la komenca strofo de la Darmapado. Ja, vere! El la pensoj kreskas agoj. Tiu, kiu malbone pensas, nature, ankaŭ parolas malbone: tiu, kiu bone pensas, ordinaire havas ankaŭ Pravan Parolon kaj Pravan Agon aŭ konduton. La

sekvanto de la Budho, en sia parolo estas vera, kaj detenas sin de malicaj, malafablaj, vanaj, kalumniaj kaj falsaj vortoj: en sia agado li detenas sin de mortigo, ŝtelado, malmorala seks-agado, kaj de neabstino de alkoholaĵoj.

Estas atendate ke Budhano alprenu Pravan Manieron de la gajno de vivrimedo: li servas sian familion kaj sin mem sen kaŭzi domaĝon al siaj samspecanoj kaj aliaj. Li detenas sin de la sklavkomerco, kaj de la vendado de venenoj, alkoholaĵoj, best-viando kaj mortigaj armiloj. Tamen, oni devas memori ke Prava Vivrimedo estas malofte Riĉa Vivrimedo. Tial oni ne ĉagreniĝu se la plenumo de ĝi ne portas riĉecon kaj ties akompanaĵojn, la materialajn luksaĵojn de la vivo. Ni vidas homojn kiuj riĉiĝas, sed iomete de la prava vido, aŭ ekrigardo en ilian Karman fundon komprenigas al ni, ke preter la vualo de iliaj palacoj kaj monaĉo, titoloj kaj famo, estas plorkriantaj vidvinoj kaj orfoj, malsatantaj homoj kaj rompitaĵoj, plendemaj mensoj kaj silentaj malbenoj, mallonge larmoj kaj suferado. "Ili estas riĉaj laŭ oro, sed malriĉaj laŭ Honoro kaj Virto." Budhano scias: riĉaĵoj kiam malbone akiritaj, je la fino maltrafiĝas; Virto sole daŭras.

La praktikado de la supre menciitaj kvin paŝoj helpas ke oni kulturu altruismajn tendencojn, kaj liberiĝu de rasaj, naciaj kaj provincaj limoj. Ĉio ĉi preparas la kampon por la sesa paŝo, nome, Pravaj Penoj aŭ Mensaj Klopodoj.

Prava Scio kaj Pravaj Aspiroj instigas nin al Prava Agado, kiu enhavas la tri paŝojn, nome, Prava Parolo, Pravaj Agoj, kaj Prava Vivrimedo. Ĉi tiuj devigas nin, ke ni ludu nian rolon honeste kaj bone kun la objektiva mondo.

La sesa paŝo gvidas nin pli profunden kaj signifas Introspektan Idealon. Per Introspekta Klopodo, ni kulturadas la volon por detruigi malbonajn pensojn jam leviĝintajn, kaj subpremi malbonajn pensojn ankoraŭ ne leviĝintajn, por etendi kaj pliigi bonajn pensojn kiuj jam leviĝis, kaj produkti bonajn pensojn kiuj ankoraŭ ne leviĝis.

Pluen, la Vojo direktas nin al la kulturo de Prava Atentemo. “Forgesu la malbonon faritan al vi, estimu la bonkorecon montritan al vi” estas bona maksimumo kaj helpas al trankvilo. La kulturado de Bonkoreco alportas feliĉon kaj al oni mem, kaj al aliaj: estas konate ke vera kompato kuracas multajn malfacilajn mensajn vundojn.

La Sepa paŝo ankaŭ instruas nin, antaŭ ol iri al la Fina Paŝo, ke ni analizu la korpon, komprenu ĝiajn komponaĵojn, kaj memoru la Kvin Psikajn malhelpaĵojn kaj la sep Principojn de Iluminiĝo. Ĝi ankaŭ signifas la konstantan observadon de niaj pensoj, por ke ne enŝtelu malbonon neatentate. Prava Atentemo plue povus signifi, memoron de la malproksime pasintaj vivoj. Oni diras, ke kiam ĉi tiu paŝo estas perfektigita, tia memoro povas esti akirita.

Jam nun la disĉiplo. fariĝas instruisto: li uzas sian energion, fizikan kaj mensan, sen la plej malgranda dispezo de ĝi. Li komprenas aferojn laŭ ilia vera perspektivo: “Li vidas kiel estaĵoj malaperas kaj reaperas, kial ili estas malbonaj aŭ bonaj, belaj aŭ malbelaj, bonŝancaj aŭ aliaj; mallonge, li vidas kiel estaĵoj venas ĉi tien laŭ iliaj faroj.”

Fine ni alvenas al la plej alta piedŝtupo de la Ok-ŝtupa-ŝtupetaro — Prava Koncentriĝo, de kiu Nirvano estas nur salto. Je ĉi tiu stadio niaj pensoj ne vagas: la energio estas

enkolektata kaj konverĝigata al fokuso. Konsekvence oni estas Iluminiĝinta. “Profunda ekstazo de scio venos al li kiu strebas meditadi en saĝeco kaj amo.” Ni konas la beatan plezuron, ni sentas kiam ni solvas problemon per intensa mensa aplikado. Kia feliĉego tio estos kiam ni solvas la problemojn de la Vivo finfine per Prava Meditado! Prava Koncentriĝo kondukas de feliĉego al feliĉego, de *Jhāna* al *Jhāna*, ĝis la Feliĉego ne havas katenojn kaj enfluas la Senfinecon de Nirvano.

8. Mem-Kulturo

Per tio kio estas jam dirita, oni povas kompreni, ke la Vojo estas gradigita plano por mem-kulturo, en kiu la sekvontaj kvar stadioj estas evidentaj:

1. *Sīla* — Morala Pureco en la Agoj,
2. *Samādhi* — Koncentriĝo,
3. *Paññā* — Vera Scio,
4. *Vipassanā* — Envido.

Sen *Sīla*, *Samādhi* estas neebila; sen *Samādhi*, *Paññā* estas neebila kaj sen *Paññā*, *Vipassanā* ne estas ebla. *Samādhi* estas la ponto kiu kunligas la fizikan kun la mensa kaj kondukas al la super-mensa stato. *Sīla* (morala pureco) estas unue esenca sur la Vojo al Liberiĝo. Sukceso en *Sīla* estas invito al *Samādhi*: Sukceso en *Samādhi* signifas *Paññā*, kiu donacas *Vipassanā*.

Ĉi tie estu ankaŭ komprenate, ke sinsekvo de *Sīla*, *Samādhi*, kaj *Paññā* ne signifas ke *Sīla* devas esti perfektigita ĝis la fina nivelo antaŭ ol *Samādhi* povas esti praktikata, aŭ ke *Samādhi* devas esti tute perfektigita antaŭ ol ia grado de *Paññā* povas esti akirata. Ne. Grado de *Sīla* kondukas al grado de *Samādhi*, kiu siavice donas la respondan gradon de *Paññā*. La *Paññā* donas *Vipassanā* kiu informas *Sīla*. Tiam, *Sīla*, ekirante de pli alta nivelo, kondukas al *Samādhi* de pli alta speco, kiu donas *Paññā* de pli bona grado. Tiel *Sīla*, *Samādhi*, kaj *Paññā* daŭre progresas laŭ spiralo, pli alten ĝis ĉiuj ĉi konverĝas en UNUECON kaj ekfloras en Nirvanan Ekstazon, la Ekstazon de Fina Liberiĝo el *Dukkha*.

La Sinjoro Budho solvis ĉiujn problemojn de ĉi tiu mondo per Meditado. Li trovis, ke la mondo estas Ripetado de *Dukkha* kaj deklaris la Vojon de mem-kulturo kiel panaceon por konduki el ĉi tiu mizera kaj sensignifa ripetado.

9. La Vivovojaĝo

Laŭ la Budhana vidpunkto, la vivo estas Vojaĝo de *Dukkha* (malĝojo) ĝis *Sukha* (ĝojo), el la katenoj de *Avijjā* (ne-scio) al Nirvana-liberiĝo.

Same kiel preciza horloĝo, ĝusta scio pri la lokoj de fervojaj stacidomoj kaj la funkcia utileco de la vagonaro estas utilaj por helpi ke ni trafu la vagonaron, tiel Prava Scio estas necesa por gvidi nin al la “stacidomo” de Darmo: same kiel posedo de valida fervoj-bileto rajtigas nin

ekvojaĝi, tiel ankaŭ Prava Aspirado povas meti nin sur la Vojo. Sed, kiel la nura posedo de bileto, ĉeesto ĉe la stacidomo, la deziro ekvojaĝi kaj niaj koraj rilatoj kun la fervojistaj instancoj ne estas sufiĉaj por finkonduki nin al nia celo, ĉar, por ke ni atingu nian vojaĝfinon ni devas Utiligi la biletan kaj komenci la veran vojaĝon, tiel la nura aspirado por bono sen vera konforma agado, restas nur pia deziro. La Sinjoro Budho proklamis, ke la intenco de la Vojo ne estas simple por pia kredo: por esti utila ĝi devas esti praktikata.

La Okera Vojo estas Vojo de Mem-Venko — Granda Stuparo, kiu gvidas nin paŝon post paŝo el la ŝlimejo de ĉi tiu mondo al la glora feliĉplena alteco de Nirvano. Ĝi estas Mapo de Virto. La nura posedo de ĉi tiu Mapo, kvankam tio estas bona, ne faras ke oni estas vera Budhano: teologiaj diskutoj ne helpas nin krom por ekzameni ĉi tiun Mapon. Tio kio estas bezonata estas Sperto. Ĉi tiu Mapo estas la Vero, kaj ĉi tiu Vero, por esti sciata, devas esti absolute komprenata, kaj tiel per la memo sole.

La Sinjoro Budho montras al ni la Vojon de la *Kusala* (bona) Vojaĝo. Ĝi estas Lia plej bona Preskribo la Majstra-Preskribo por direkti nin for de la rokoj de ekzistado kaj la ŝtormoj de la vivo. Ni aŭ uzu ĝin aŭ lasu ĝin, laŭ nia volo: uzu ĝin kaj gajnu Nirvanon, lasu ĝin kaj estu subpremata en la ŝlimejo de mizero. Ne estas devigo: oni estas libera sekvi sian volon sed oni devas fronti la konsekvencojn de sia agado. Eĉ la Budho ne povas disigi nin de la fruktoj de niaj faroj. Pro malbono farita ni devas suferi; pro la bono farita ni rekompensiĝos. Estas absolute nepartia Justeco.

Se ni deziras uzi plej bone niajn vivojn, ni devas sukcesigi nian vivvojaĝon. Por fari tion ni devas paŝi la Vojon por atingi la Lumon: La Princo Sidharto paŝis ĉi tiun Vojon kaj fariĝis la Sinjoro Budho kaj iu, kiu paŝas ĝin, povas atingi Nirvanon.

10. La Kodo de Etiko

Mirinda estas la malkovro de la Kvar Grandaj Veroj; nobla estas la Okera Vojo. El ĉi tiuj sublimaj Veroj la Budho evoluigis rimarkindaj Kodon de Etiko kaj Moralo, kiu formas la praktikan flankon de Lia granda filozofio: kaj ĉi tie ni mondemaj homoj devas serĉi por praktika gvidado. Tiu kodo estas '*Panca-Sila*, la Kvin Principoj'. Ĝi ordonas al ni, ke ni ne mortigu aŭ ŝtelu, ke ni estu ĉastaj, superregu niajn langojn kaj evitu alkoholaĵojn. Tiu ĉi kodo estas simpla, sed ĝia belo brilas nur por la praktikado. Ĝi estas kodo, kiu mirigis la mondon, kiu ne povas facile kompreni kiel la Dharmo povas, sen Dio aŭ Animo, atingi tian subliman altecon de Etika Moralo. Ĝi estas kodo, ne nur bonega sed ankaŭ daŭra: ĝia lumado reflektiĝas en ĉiuj moralaj kaj sociaj movadoj de la mondo.

Ne nur tio. Ĉi tiu kodo, kvankam formanta nur parton de praktika Budhismo, tamen estas tiel sublima en ĝiaj potencoj, ke ĝi povas solvi efike ĉiujn sociajn kaj politikajn komplikaĵojn de ĉi tiu terĝlobo, kvankam tiel kompleksaj,

komplikaj kaj perpleksigaj ili estas. Estas nia devo kompreni la ugestojn sub ĉi tiu rimarkinda kodo.

“Ne mortigu” estas simpla principo, sed laŭ signifo ĝi estas vastega. Ekvideble ĝi ordonas la forigon, ne nur de la bestaj krimoj de la buĉejo, sed ankaŭ de ĝia ekzisto mem.

La principo evidente malestimas la memmortigon, kondamnas la ĉasadon kaj mortigon pro amziĝo, malsaĝeco, distro aŭ ofero; ĝi ankaŭ kondamnas la mortpunon, kiu estas postrestaĵo de barbaraj tempoj, kaj ĉesigas militadon anstataŭante ĝin per racia arbitracio.

Ni sopiregas pacon, personnan, socian, nacian kaj internacian: ja nobla idealo alstrebinda por la homaro. Sed ĉu ĝi estas atingebla dum niaj agoj kontraŭas niajn idealojn? Dum ni konstante faradas senkompatan militon organizite kaj brute - kontraŭ niaj senofendaj multaj kunuloj pro la nutro, amuzo aŭ malsaĝo, kiel povas esti dirate, ke ni jam lernis la lecionojn de kunsento kaj bonkoreco, tiel esencajn por realigi nian celon de paco en nia mezo?

Ni devas humile konsenti, ke, kun nia tuta fiero pri kulturo kaj civilizado, ni ĝenerale ankoraŭ ne multe evoluiĝas preter la besta stadio. Tamen, estas iom kontentige ke la krudaj ŝokoj de militoj kaj ĉiuflanka mizero malrapide petas nin al la kompreno, sen la sentoj de universa amo, paco ne povas esti sur la tero. Budhismo instruas senliman kompaton, kompaton kiu estas ĉio-ampleksa kaj universala. Ni honoras la grandan Vizion de Kompato, la Kompat-Vizion de bonkoreco kaj universa

“*Mettā*”[§] de la Sinjoro, kiun li etendis ne nur al la homaro sed al la tuta sentpova mondo.

La sekvanta principo, “Ne ŝtelu” estas alia “provizejo” de praktika Vero. La kruda ŝtelprenado estas nur unu aspekto de ŝtelado. La malnobla ekspluatado - individua aŭ nacia - la depreno de alies porcio, komerca malhonesteco kaj ĉiuj aferoj tiaj estas en ĉi tiu klaso.

Plue, moraleco estas la bezono de la nuntempo. Seksaj ĵaluzoj kaj krimoj formas multon de la “fajro” de ĉi tiu mondo. Ja “same kiel fajro, sekso estas bona servanto sed malbona estro”. La volupto jam estis ĝuste nomata unu afero el la plej grave malakordantaj kun spirita progreso.

La fina principo pritraktas alkoholaĵojn, kiuj kondukas al perdo de reputacio, famo, riĉaĵoj, racio, sano kaj eble la vivo mem. La Sinjoro Budho avertis nin ne nur ke ni ne drinku, sed ankaŭ ke ni nin detenu de tio, ke ni kaŭzu ke aliaj rompu ĉi tiun kaj aliajn principojn kaj de konsento al agoj kontribuante al tia rompo.

Ĉi tiuj estas mallonge la sugestoj de ĉi tiu Granda Morala Kodo. Juĝejoj, malliberejoj, buĉejoj, veneraj hospitaloj kaj, je certa grado mensmalsanulejoj, ĉiuj estas elokventaj tribunoj al, kaj elmontrado de, la manko de la praktikado de ĝi. Per studo de la progreso de l’Homaro pruviĝas al ni, ke ĉiuj malbonoj registritaj en historio, ekde nememorebla tempo ĝis la nuna tago, estas la rezulto de efektiva malatento al unu aŭ ĉiuj de la Kvin Principoj.

§ *Mettā* (noto al la Esperanto-traduko): praktika bonvolo al ĉiuj estaĵoj.

11. La Vojo al Perfektiĝo

Pañcasīla enkondukas mem-kulturon kun la fina celo de memrego. Ĝi estas la minimumo kiun Budhismo atendas de sia laikaro — *Upasak'*oj kaj *Upasik'*oj. Tamen, oni devas klare kompreni ke *Pañcasīla* ne estas kompleto da ordonoj por sklavigi homajn estaĵojn: ĝi estas kodo etika volonte akceptata por gvidado dum la vivo.

La pli alta spirita evoluado necesigas pluajn meritajn ekzercojn. Tiuj estas la Dek Pozitivaj Principoj de Budhismo, nome: —

1. Malavareco,
2. Moraleco,
3. Meditado,
4. Lasante, ke aliaj partoprenu en niaj bonfaroj,
5. Kunĝojo pri alies meritaj agoj,
6. Servantaj aliajn,
7. Respekto al la respektindaj,
8. Klarigante la Veron al aliaj,
9. Aŭdante la interpreton de la Vero, kaj
10. Venante en la Rifuĝon de la Tri Juveloj de
Budhismo, nome Budho, Darmo kaj Samgo.

La unua kaj plej antaŭa el la supraj estas “*Dāna*” aŭ Malavareco. Ĉi tiu kaj la sekvanta “*Sīla*” aŭ “Moraleco” helpas al ni nin movi de memeco al bonkoreco kaj al karakter-konstruado. La aliaj principoj plue plifortigas la direktiĝon de la movo, parte per konstruema percepto kaj introspekto, kaj parte per malegoisma servado al aliaj. Tiaj

praktikadoj evoluigas fidindan personecon kaj malfermas pordon al pluaj okazoj por mem-perfektigo.

Estas Dek eroj en la programo de Mem-perfektigo science nomataj “*Paramitojn*”, t.e. —

1. Malavareco,
2. Moraleco,
3. Apartigo de voluptaj deziroj,
4. Saĝeco,
5. Heroa klopodado,
6. Pacienco,
7. Verdiremo,
8. Fervora volo,
9. Universala bonkoreco, kaj
10. Trankvilo.

Oni devas perfektigi en ĉi tiuj Dek eroj antaŭ ol oni povas atingi la Lumon de “*Bodhi*” (Saĝo). De ĉi tiuj oni estas farita Budhon, la Perfektan Iluminiĝinton, ankaŭ la Perfektan Kompatulon.

12. La Budhisma Idealo de Saviĝo

Pañcasīla malfermas por ni la pordojn de la granda universitato de Budhisma Kulturo. La kultura progreso siavice alportas spiritajn ekvidojn, kaj siatempe kondukas al soifo por senpera spirita scio. Tiel estas kontaktata la vojon

al Tuta Liberiĝo. La progreso sur la Vojo, tamen, estas multe pli rapidigata post rezigno de mondaj ligiloj. Ĉi tiu sinapartigo, kvankam praktikebla en la hejmo, estas pli faciligata en la ĉirkaŭaĵoj de monaĥejo. La monda vivado necese kreas kaj multigas avidojn kiuj kreas “Karmon” kaj tiel kateniĝon. Aliflanke la retiriĝo al sanktaj ĉirkaŭaĵoj plejeble malpliigas avidojn kaj tiel helpas akceli la spiritan progreson. Tiel, la persona progreso komencata per la praktiko de “*Pañcastā*”, se oni persistas en ĝi, pavimas la vojon por rezigno kaj eventuale malfermas la pordon al homa Perfektiĝo, la Nirvano.

Nirvano estas la Plej Alta Frukto, la fina celo al kiu homo povas aspiri. Estas nenio preter ĝi. En ĝi centriĝas la aspiradoj kaj la plej noblaj sentimentoj de la tuta Budhana Mondo.

Kio estas ĉi tiu Celo de la Vivo, ĉi tiu Idealo de Saviĝo?

Unu skolo difinas ĝin kiel “estingo de iluzio kaj la memo”: alia skolo nomas ĝin “atingon de la Vero”, kaj jen ni verŝajne devas fronti du diverĝantajn vidpunktojn. Unu asertas, ke Nirvano estas NENIO — la senvalora ciferego, nulo — kaj kredas al tuta neniigo, dum la alia skolo bildigas ĝin kiel staton de Absoluta Feliĉego kaj trankvileco, kiu scias nenian ŝanĝon, nenian doloron, nenian naskiĝon kaj morton. Kvankam ili ŝajne konfliktas, akordigi ĉi tiujn difinojn ne estas malfacile. Se oni komprenas ke Nirvano estas stato, kiun ni ne povas imagi aŭ kompari kun io ajn ĉe la dispono de nia ordinara konscio, sekvas ke ĝi estas “la tuta nuligo de ĉio, kio konsistigas la fizikan homon” — “stato de tuta ĉeso de ŝanĝo, perfekta ripozo, foresto de deziro, iluzio kaj malĝojo”.

Ni citu el la Libro de Seriozaj Eldiroj: —

“Ekzistas, Ho Fratoj, Regno kie estas nek Tero nek Akvo, nek Flamo nek Aero; nek la kunekzisto de Kono kaj Nekono estas Tie: ne ĉi tiu Mondo, nek alia, nek Suno nek Luno. Tio, Fratoj, mi deklaras al vi, estas nek Fariĝo nek Forpaso: nek Vivo, nek Morto, nek Naskiĝo; Senloka, Senŝanĝa kaj Senkaŭza: — Tio estas la Fino de Malĝojo! Nirvano”.

Ĝi estas bonega difino: en ĝi ekzistas la potenco de pozitiva aserto kunigita kun la neado de ŝanĝanta fenomeno. Dirante “Nirvano estas Nenio” signifas ke la plej bona, kiun ni povas koncepti, neniigis en komparo kun ĝi, kaj dirante ke ĝi estas “Entute Feliĉego kaj Paco nerompita” estas konsenti al ĝia absoluta naturo.

Kio ajn Nirvano estas, ĝi estas Senfino preter la kompreno — Senfina Nenio aŭ Senfina Ĉio. Fakte, nomante ĝin aŭ “Nenio” aŭ la “Absoluto” tiusence, signifas same. La Sinjoro Budho perceptis ĝin kaj proklamis ĝin. Ĝi nepre estas Io. Vere ĝi estas Io. La atesto de la Sinjoro estas “Ekzistas — Nirvano”. Tio decidas la demandon. Nirvano estas afero de mem-konado kaj ne kampo por vana spekulativo. Vortoj estas malbonaj komunikiloj por la supere sublimeskoncepto, sankte enfermata de ĝi: la taksado de ĝi per senta percepto estas neebla. Tial estas neelbe difini Nirvanon pozitive: efektive, difini ĝin signifas malkonfesi ĝin. Estas pro tio, ke la Sinjoro Budho tenis noblan silenton pri ĉi tiu aspekto de la Granda Realo. Lia emfazo estis ne tiel multe pri Ĝia naturo kiel pri la neceso por paŝado laŭ la Vojo, kiu neeviteble kondukas al Ĝi. La Mem-perfektigo estis la ĉefa temo de Lia Instruado: kaj se saĝeco formis la vefton, “La Servo super la Egoismo” estis nepre la varpo en

la strukturo de Lia koncepto de Mem-perfektigo. Fakte tiom da graveco estis donata al tiu lasta, ke rimarkinda “idealo de la vivo” evoluis el ĝi. La Idealo estas la Idealo de Bodisatvo, pro kio oni devas meti la servadon al aliaj eĉ antaŭ la propra saviĝo. Trapenetrita de tia spirito, la individuo iradas de vivo al vivo ĝis la maksimume farebla servado estas plenumita por socio. Tiam, kaj nur tiam, la individuo retiriĝas en Nirvanon. Tia avenuo al saviĝo estas konsiderata kiel la plej alta.

13. La Budhisma Triunuo kaj Adoro

La Instruanto (La Budho), Liaj Instruoj (La Darmo) kaj la Instruatoj (La Sankta Ordeno, la Samgo) formas la Tri Gemojn (*Triratana*) de Budhismo. La laikoj fervore adoras ĉi tiujn, aspirante al asimilo de la virtoj propraj al la personeco de la Budho, strebante al la lernado de la saĝeco esenca en Liaj predikoj, kaj por gajni la gvidadon de la aktualaj konfesantoj kaj praktikantoj de la granda Saĝo. La adorado, oni komprenu, estas nek rito nek preĝo: ĉi tiuj estas sensignifaj en Budhismo, la unua estante kateno kontraŭ sendependa pensado, kaj la lasta malracia supozo pri kaprica potenco preter la Leĝo. Ĝi ne estas pacigo de idoloj, nek nur memsugesto. Almenaŭ ĝi estas racia meĥanismo por inspirado, kaj plej bone ĝi estas preskaŭ absolute necesa helpo por paŝado sur la Vojo kun memkonfido kaj saĝo, kun

bonvolo kaj persistemo ĝis la Celo estas atingata kaj saviĝo estas gajnita, aŭ oni fariĝas Budho mem.

El la Tri Gemoj ni ĝis nun pritraktis nur kelkajn aspektojn de la Dua, la Darmo aŭ Instruoj de la Sinjoro Budho. Aludo jam estis farata pri gravaj kaj praktikaj doktrinoj kiel La Leĝo de Karmo, La Fenomeno de Renaskiĝo, la Kvar Noblaj Veroj, la Okera Nobla Vojo, la *Pañcasīla*, la Dek Faroj de Merito, la Dek Perfektoj kaj la Nirvano.

La Samgo estas la Tria Gemo. Ĝi estas la sankta Ordeno de Monaĥoj, kiuj, rezignante la mondon sekvadas la Vojon de Virto, de malegoisma servado kaj Introspekto. La Budhanaj monaĥoj formas admirindan demokratian societon: efektive la monaĥa administrado estas perfekta demokratio en religio. Persona kaj monaĥa disciplino estas atentata precize laŭ la "*Vinaya*" principoj (La Kodo de Monaĥaj reguloj): la Fratoj sin ĵuras al ĉasteco, detenas sin de mono, portas oranĝkoloran robon, elektas siajn proprajn superulojn, posedas nenion krom objektoj nepre necesaj, akiras sian nutron per almozpetoj kaj pasigas kiel eble plej multe sian tempon en mem-disciplino aŭ por instrui aliajn. La eniro en la Samgon, tamen, ne signifas ĵuron vivlongan: Tiuj kiuj trovas, ke la disciplino estas tro malfacila, estas permesataj reiri al la monda vivo.

Memevidente, la institucio de la Samgo estas avantaĝo al la socio. Per principo kaj praktiko la sankta frataro edukas la laikojn pri la arto de paca vivado kaj inspiras al ili fruntadon al la realaĵoj de la vivo heroe kaj filozofie, akordante justecon kun toleremo kaj konduton kun bonvoleco.

La Unua kaj Plej Grava Gemo de la Budhisma Triuno estas la Budho Mem. Ni rigardu mallonge la vivon de la Sinjoro, el kies Majstra menso kaj klopodoj venis ĉi tiu mirinda sistemo. Princo *Siddhattha*, oferante sian vivadon de lukseco kaj ĝojo, forlasis la palacon, antaŭvidon al trono, siajn proksimulojn kaj karulojn, kaj ekvojaĝis por serĉi Veron, kiu liberigus homojn de maljuniĝo, malsano kaj morto. Li jam konstatis, ke en la monda vivo de lukso ne troviĝas la semo de liberiĝo, kaj pli poste lia persona sperto instruis al li, ke estis vane atendi liberiĝon per asketaj faroj, kiujn li elspertis ĝis ekstreme antaŭ ol li forlasis ilin. Li ekpaŝis la Mezan Vojon, kaj en unu Granda Nokto — granda por li kaj granda por la homaro — dum li meditis sub la Bodhi arbo ĉe Budha Gaya, li pasis de Ĵano** al Ĵano, de ekstazo al ekstazo, kaj renkontis la Veron vidalvide. Tion Li kristaligis en Sia glora Darmo, kiu ankoraŭ vivas kaj briladas.

14. *La Misia Vervo*

La Alta Budho estas inter tiuj, kiuj plej frue konstatis la fakton ke la Vero briladas pro la partopreno en ĝi kun aliaj. Tio donis al liaj Instruoj misian mandaton, kaj okazigis ke la Lia estis la unua misia religio. Liaj admonoj al la unua aro de misiistoj estis: —

** Ĵano (noto al la Esperanto-traduko): stato de super konscio.

“Iru, Ho Bikŝuoj, kaj migradu for por la gajno de la multaj, por la bonfaro de la homaro, pro kompato por la mondo, por la bono, por la gajno, por la bonfaro de dioj kaj homoj. Proklamu, Ho Bikŝuoj, la Doktrinion belegan je la komenco, belegan en la mezo kaj belegan je la fino, laŭ la spirito tiel ankaŭ laŭ la vortoj kaj prediku vi vivadon de sankteco, perfektan kaj puran.”

Tiel ekiris el la sanktejoj de *Benares* (Hinduĵo) Perfektigitoj, nombre sesdek-unu, inkluzive de la Sinjoro Budho Mem, en diversaj direktoj, kun mesaĝo tiel simpla, tiel dolĉa kaj tiel nobla, por la bono de la tuta mondo.

La doktrino de la Budho, tiel racia kiel plena de praktika virto kaj Vera Espero, pro la rajto de ĝia nura simpleco bazita sur faktoj, profundeco bazita sur saĝeco, toleremo radikata en bonvolema ama bonkoreco, kaj ĉio-ampleksa simpatia alvoko, foriganta nenaturajn apartigojn de kasto, riĉeco kaj socia rango, estis destinita elvoki universalan respondon kie ajn ĝi estis predikata. La propra valoro de la doktrino kaj ĝiaj eksteraj potencoj por servado, estigis allogon, kiu resonis longe preter la limoj de Hinduĵo kaj longe post la tempoj en kiu ĝi estis predikata. Estis la inspiro de la granda Darma kiu kreis grandan monarkon kiel *Asoka*, pri kiu *Wells* juste diras: “Inter la dekmiloj da nomoj de monarkoj, kiuj svarmas en la kolonoj de historio, la Moŝtoj, graculoj kaj serenuloj kaj altaj reĝoj kaj similaj, la nomo de *Asoka* briladas, kaj brilas sola, stelo.”

Misia fervoro disvastigis la doktrinion de la Budho, ne nur al la insulo Cejlono, sed ankaŭ al aliaj sendependaj reĝlandoj ĉirkaŭaj — al Ĉinujo kaj Tibeto en la Nordo, al landoj proksimaj kaj en la grandaj oceanoj de la

Malproksima Oriento kaj Sudo, kaj eĉ al la regnoj Sirio, Makedonio, Egiptujo k.a. en la Okcidento. La Lumo de la Darmo, kie ajn ĝi iris, sukcesis levi la etiko-moralan tonon de la popoloj: ĝi stimulis klerecojn, artojn kaj sciencojn kaj tiel fariĝis la bazo de sennombraj kulturoj kaj civilizacioj. La mesaĝo de la Budho, proklamita jam antaŭ dudek kvin jarcentoj kaj varme kaj vaste ricevita, nun estas la konsolo kaj espero de pli ol unu trionoj de la homaro. Eĉ la ne-Budhana mondo estas plena de laŭdo pri ĝi.

15. Religio kontraŭ Dharmo

Ni povas bone vidi, ke Budhismo estas Granda Religio. Sed ni purigu niajn mensojn de iaj miskomprenoj dirante, ke Budhismo estas nur Religio. Ja, nomi ĝin tiel, estas etigi kaj malestimigi ĝin. Ni eble demandus do, kio ĝi estas? Ĝi estas Dharmo. Estas akra distingo inter Dharmo kaj Religio. Dharmo estas Vero, dum Religio estas kompromiso de Tempo kaj Loko kun Vero. Religio estas oro malbriligita de historio kaj geografio, de superstiĉo kaj tro-fervoro. Dum Dharmo estas netuŝita, absoluta kaj neŝanĝebla, Religio estas nur loka manifesto, elpensita por servi pli malpli lokan celon kaj tial estas degenerema.

La doktrino de la Budho estas Dharmo superega, ĉar la granda Sinjoro renkontis la Veron vidalvide kaj deklaris ĝin. La Vero estas la centra pivoto de Liberiĝo, kaj Dharmo estas la plej proksima metodo por rigardi ĝin. La Budha-Dharmo estas unika rimedo por vidi la Veron el apudesto, sed ni ne

pensu, ke la doktrino donata de la Budho estas la Tuta Fonto de Vero detala. Ĝi, fakte, estas ĝenerala vido de la Tuto kun Speciala vido de Parto. Eĉ Sinjoro Budho foje diris al Siaj disĉiploj ke la scio komunikita al ili estis multe malpli ol la scio nekomunikita. La scio donita, tamen, estis pli ol sufiĉa por la atingo de la plej alta celo - Nirvano. Tia estas la gloro de la Dharmo.

16. Budhanaj Atingoj

Traktinte Budhismon mallonge, ni povas nun esti pridemandata:

Kian Kontribuadon faris Budhismo por la bono de la Mondo?

Aparte de la plenumo de la granda servo la deklaro de senpera scio de la Vero en tre profunda kaj praktika maniero, Budhismo jam estis granda pozitiva potenco. Ĝi, per la inspirado al racia sinteno, larĝeco de bonvolo, profundeco de scio, libereco de dogmo, spirito de memfido, sinteno de tolerema kompreno, donemo kaj vizio de kompatato, ne nur liberigis la homon el la premego de sensenca "timo" kaj venĝemaj dioj, sed ankaŭ estas donacinta al li riĉan perspektivon de la vivo, plena de gloro kaj nun kaj poste.

Budhismo estas Religio de Libereco. Sub ĝi la viro estas libera kaj tiel ankaŭ estas la virino. Birmaj virinoj ĝuadas multajn rajtojn, kiujn eĉ siaj plej progresemaj Eŭropaj

fratinoj jam ekenvias kaj postulas. Ili efektive montris per sia ekzemplo, ke la ideo de virina malsupereco estas nur artefarita limigo, kaj ke en ĉiu ajn medio, ne gravas ĉu komerca, hejma, socia, politika aŭ profesia, la ina sekso ne nur ne estas la pli malforta sekso, sed povas antaŭen puŝi, ŝultron ĉe ŝultro, kun la alia sekso.

Budhismo ankaŭ kulturigas delikatan guston kaj estimon al la arto. Belaj Pagodoj kaj skulptitaj monumentoj pruvas ĉi tiun bonguston.

La stimulantanta influo, kiun la Darmono havas sur la disvolviĝo de la artoj kaj sciencoj kaj la paco kaj feliĉo de la homaro, ne povas esti flankenmetata. Por ekvidi kion la Darmono jam faris, oni simple sinturnu al la Asoka epoko en la historio de Hindujo. Sub la granda Imperiestro, la artoj, sciencoj, klereco kaj erudicio floris. Hospitaloj estis establita kaj por homoj kaj por bestoj. Kaj virto, paco, prospero kaj feliĉo regis. Tio kio estis, povos reesti, se la volo ekzistas tiel fari.

Antaŭ ol ni finu, estas menciinda la kontribuado, kiun Budhismo povas fari por solvi la nuntempajn mond-komplikaĵojn, kaj kiun ĝi povas fari por antaŭenigi la estontan bonon de la mondo, t.e. kio estas la valoro de Budhismo al la mondo — nuntempa kaj estonta?

17. *La Mondo Hodiaŭa*

“Ĉio”, deklaris la sinjoro Budho en la Fajro Prediko “estas brulanta, kaj pro kio ĉio brulas? Pro la fajro de avido, malamo kaj iluzio.” La fajro pri kiu la sinjoro Budho parolis antaŭ pli ol dudek-kvin jarcentoj, ankoraŭ brulas kaj eĉ pli furioze hodiaŭ. La mondo estas flamanta per fajro. La fajro de avido, malamo kaj iluzio estas evidenta ĉie. La mond-militoj estas teruraj pruvoj de ĉi tiu fajro. Individua kaj kolektiva materialismo, universala internacia malfido, la malnoblaj ĵaluzetoj de diversaj nacioj, ilia manio per pozado kiel gardistoj de mond-bonfarto, la kreskado de la arto de egoisma ekspluatado, misuzo de scienco, la abomena pliigo pri la arto de detruo, la kompleksa afero pri arimiloj, kaj, super ĉio, antaŭsentoj de alia mondo-milito, multe pli detruiga ol iu el la antaŭaj, ĉiuj ĉi estas ĉapitroj en la glorado de la fajro, kiun la moderna civilizacio eligas per ĉiu spiro.

Se ni ekrigardas la mondajn aferojn de la nuna tempo, ni post ne longe konstatos, ke la moderna civilizacio estas en danĝera stato. Ve! la moderna ilumino mizere malsukcesis trankviligi la plej malnoblajn pasiojn en la koroj de homoj. Se pravaj penoj ne estos rapide farataj, kolapso estas neevitebla.

La moderna scienco kreskis sur la grundo de okcidenta civilizacio, kiu malfeliĉe nun fariĝas mem viktimo de la scienco. La scienco, efektive, estas dutranĉa glavo! Ĝi estas amiko de konstruo hodiaŭ, kaj la kunhelpanto de detruo morgaŭ. Ĝi povas helpi, ĝi povas detrui, ĉio dependas de la maniero laŭ kiu ĝi estas manipulata. Tio estas pro tio, ke la

scienco ne havas volon propran. Ĝi mem estas nobla, sed ĉar ĝi ne havas propran volon, ni nur povas vidi ĝiajn efikojn tra la okulvitroj de la civilizacio en kies tenegoj ĝi hazarde estas. Ĝi povas fari bonon kaj ĝi povas fari malbonon, ĉio dependas de la civilizacio rilatanta kun ĝi.

18. Kion la Mondo Bezonas

Ni rigardu la tutan aferon alimaniere: Akceptante la sciencon kiel idon de la civilizacio, ni vidas ke la infano, estante la sola, estis pro necese troindulgata infano. Aŭ la infano estu permesata persekuti la patrinon, kiun agadon evidente jam komencis^[tiel], aŭ la patrino devas, pro la profito kaj de ŝi kaj de la infano, adopti pliaĝan filinon kiel fratinan ludkunulon por modifi la morojn de tiu ĉi infano. Tiu ludkunulo estas la religio. La Budha Darma estas la plej taŭga por esti tia kunulo, ĉar ĝi, pro tio, ke ĝi havas la meriton esti psikologie scienca kaj perfekte racia, havas apartan allogon por la moderna scienca menso.

Unu insista verkisto en la fruaj jaroj de ĉi tiu jarcento diris: — “Vere granda estas la beno donita de moderna scienco al la mondo. Ĝi kreis sistemon de komerco kaj komunikado sen paralelo en la historio de la homaro; ĝiaj registaroj laŭ la interna administrado estas vaste progresintaj super tiuj de antikvaj tempoj; ĝia juro estas grandskale preter korupto; ĝia kapablo por kunagado kaj organizo estas neĉikanebla. Sed kun ĉi tiuj grandaj meritoj,

ĉi tiuj aferoj, kiuj gravigas ĝin, ĉu venas pliigo de feliĉo al la amasoj de la homaro? Tiu estas la Granda Demando, laŭ la respondo al kiu la civilizaio devas esti juĝata.” La respondo evidente estas “*ne*”, emfaze “*ne*”.

Plue li diras: — “La energioj de la okcidenta civilizacio estas turnitaj tien, en direkton, el kiu neniam fina kontento povas esti gajnita.” “... La vera feliĉo dependas ne de la multo de materialaj posedaĵoj, sed de la kulturado de la pli altaj kapabloj de la menso.”

Fakte la moderna civilizacio kaj ties scienco rigardis plejparte eksteren en sia serĉo, la horizonto de kiu etendiĝas^[tiel!], dum novaj veroj estas malkovrataj. la cirkonferenco pli larĝiĝas sen fina stadio de kontento. Kiel la sciencaj malkovroj provizis por satigi la sentojn, tiel la satiĝo atingata neniam povas esti kompleta: ĉiu kontentigo ankoraŭ plu flamigas la fajron de avido. Plie ni vidas ke en kunrilato kun la eltrovitaj faktoj mankas universala bono. Introspekto povas facile kunrilatigi la eltrovojn de scienco por fina bono. Scienco estas la rezulto de ekstera observado kaj Darmo estas tiu de introspekto. Darmo estas bremsilo, kiu povas reguli aŭ nuligi la malutilajn tendencojn de la moderna scienco. Efektive la moderna aŭ okcidenta civilizacio urĝe bezonas tian modifigan forton.

La sama verkisto plue aldonas: — “Estas bezono en la okcidento por religio kiu enhavos, je la plej alta grado, filozofion, sistemo de ontologio (t.e. parto de la metafiziko, studanta la problemon pri la esto kaj ĝia unua kaŭzo), bazata sur la racio, prefere al sur kredo; religio enhavanta la plej eble klaran deklaron de etikaj principoj; religio, en kiu tute forestos tiuj animistaj konjektoj, kiuj kaŭzis la falon de

la heredaj kredoj de la okcidento, tute sen kredo pri ĉio, kio kontraŭas la racion — religio, kiu proklamas la regadon de leĝo tiel same en la mondo de materialo kiel en la mondo de la menso.”

[Feliĉe, “tia religio ekzistas — religio senkompara laŭ la pureco de sia etika instruo, netuŝata laŭ la sublimo de sia alta doktrino; religio kiu, pli ol iu ajn alia en la mondo, seservis por civilizoj, levi, altigi, antaŭenigi la feliĉon de la homaro; religio, kies fiera pretendo estas, ke ĝiaj altaroj estas nemakulataj de unu guto de sango aŭ homa aŭ besta; la religio de la leĝo de la vero, proklamita de la granda saĝulo de Hindio, la scio kaj la praktiko de kiu jam alportis pacon en la vivojn de sennombraj homoj. Provita de la forpaso de dudek kvin jarcentoj, de la vivoj de pli ol okdek generacioj de homoj, tiu religio ankoraŭ estas la konsolo kaj la espero de triono de la homaro; ĝi jam estis la kredo de forgesitaj epokoj, ĝi estas hodiaŭ la plej granda de la mond-religioj. Ĝi estos la kredo de la estonteco en tiu malproksima tempo, kiam la tuta homaro, venkata de la amo kiun ĝi instruas, iluminata de la vero entenata en ĝi, vivos finfine harmonie, memregate en reciproka toleremo, atingos finfine al vera civilizacio, al feliĉo preter la esperoj de ni, kiuj vivas nur en la infaneco de la homaro, al scio tiel longe preter nia kompreno, kiel la steloj estas superaj al niaj surtere lumataj lampoj; en tiu tago, kiam la floro de homeco floros en la lumo estonta, plenigante la tutan teron per ankoraŭ neaperinta gloro — trapenetrante ĉiujn homajn korojn per la parfumo de ĝia abloluta paco.”

Jen estas la granda mesaĝo, kiun Budhismo prezentas al la mondo. Kvankam hiperbola ĝi eble ŝajnas, ĝi ankoraŭ estas plena de vero.

Blindetigata de la travibrigaj eltrovoj de la scienco, la mondo forgesis la verajn fontojn de la vivo. Kvankam lerta la mondo estas hodiaŭ, ĝia lerteco apenaŭ estas inspirata de saĝeco. La fakto estas, ke la scienco estas blinda sen Darmo: Darmo estas la lumo, kiu donas la vidon — la vidon, en kiu egoismaj motivoj forvelkas en la grandan temon de universala bono. La scienco tial, por esti utila, devas esti inspirata de Darmo; ambaŭ kune povas gvidi la mondon al feliĉo, prospero kaj paco. Ĉi tiu mesaĝo estas speciale aplikebla hodiaŭ, ĉar la mondo estas ĥaosa kaj suferanta pro malbonaj praktikoj de la scienco. Ĉi tiu mesaĝo de Darmo-scienco-sintezo estas la mesaĝo de universala ama-bonvolemo kaj saĝeco. Ĝi dispelas mallumon kaj radias lumon sur la vojo de la vivo.]^{††}

19. La Mesaĝo de Lumo

La mondo hodiaŭ estas en nigra mallumo. Malamo kaj konflikto regas ĉie kaj avidego aldonas al la trompiĝo, farante konfuzon pli konfuza. Pro ĉi tiuj cirkonstancoj, miskomprenoj, kvereloj kaj militoj estas neeviteblaj kaj la

^{††} noto de Yamaguti: tiu ĉi parto enkrampita per [] estas poste aldonita de la tradukinto en “budhana kuriero” (1975), sed ne troviĝas en la originala libreto.

akompanantaj suferoj teruraj. Ĉar ĉi tiuj suferoj estas enradikataj en nescio, la sola solvo ŝajnas esti la tuja svingiĝo al la saĝa kaj prudenta vivmaniero.

La ĉiam-ĉeestanta Suno de Saĝeco estas alta en la ĉielo sed ĝia lumo malsukcesas trapenetri la mallumajn nubojn. Racia, sublima kaj praktika religio estas bezonata por utiligi la haveblan saĝecon, por la bonfarto de la homaro kaj por paco en la mondo. La Espero de la Mondo Feliĉe, “tia Religio ekzistas — Religio senkompara laŭ la pureco de sia etika instruo, netuŝata laŭ la sublimo de sia alta doktrino; Religio kiu, pli ol iu ajn alia en la mondo, servis por civilizi, levi, altigi, antaŭenigi la feliĉon de la homaro — Religio, kies fiera pretendo estas ke ĝiaj altaroj estas nemakulitaj de unu guto de sango aŭ homa aŭ besta la Religio de la leĝo de la Vero proklamita de la Granda Saĝulo de Hindujo, la scio kaj la praktiko de kiu jam alportis pacon en la vivojn de sennombraj homoj. Provita de la forpaso de dudek-kvin jarcentoj, de la vivoj de pli ol okdek generacioj de homoj, tiu Religio ankoraŭ estas la konsolo kaj la espero de triono de la homaro; ĝi iam estis la Kredo de forgesitaj epokoj, ĝi estas hodiaŭ la plej granda de la Mond-Religioj; ĝi estos la Kredo de la Estonteco en tiu malproksima tempo, kiam la tuta homaro, venkata de la amo kiun ĝi instruas, iluminata de la Vero entenata en ĝi, vivos finfine harmonie, memregate, en reciproka toleremo, atingos finfine veran civilizacion, feliĉon preter la esperoj de ni, kiuj vivas nur en la infaneco de la homaro, scion tiel longe preter nia kompreno, kiel la steloj estas superaj al niaj surtere lumataj lampoj; en tiu tago kiam la Floro de Homeco floros en la Lumo estonta, plenigante la tutan teron per ankoraŭ ne-aperinta gloro

traperante ĉiujn homajn korojn per la parfumó de ĝia absoluta Paco....”

Jen estas la Granda Mesaĝo kiun Budhismo prezentas al la Mondo. Kvankam hiperbola ĝi eble ŝajnas, ĝi ankoraŭ estas plena da vero.

Blindetigata de la travibrigaj eltrovoj de la scienco, la mondo forgesis la verajn fontojn de la vivo. Kvankam lerta la mondo estas hodiaŭ, ĝia lerteco apenaŭ estas inspirata de saĝeco. La fakto estas ke la Scienco estas blinda sen Darmo: Darmo estas la Lumo kiu donas la Vidon — la Vidon, en kiu egoismaj motivoj forvelkas en la grandan temon de universala bono. La Scienco tial, por esti utila, devas esti inspirata de Darmo; ambaŭ kune povas gvidi la mondon al feliĉo, prospero kaj paco. Ĉi tiu Mesaĝo estas speciale aplikebla hodiaŭ, ĉar la mondo estas ĥaosa kaj suferanta pro malbonaj praktikoj de la Scienco. Ĉi tiu Mesaĝo de Darmo-Scienco-sintezo estas la mesaĝo de Universala Ama-bonvolo kaj Sageco. Ĝi dispelas mallumon kaj radias Lumon sur la vojo de la Vivo.

20. La Eespero de la Mondo

Budhismo estas ĉiel-bela: ĝi estas ĉarma je la komenco, plaĉiga en la mezo kaj konstanta je la fino: ĝi estas racia komence, virta praktike kaj plena da espero por la estonteco.

Tiel scienca kiel filozofa,
Tiel simpla kiel profunda,
Tiel racia kiel praktika,
Tiel utila kiel esperplena,
Tiel sincera kiel bonvolema,
Tiel antikva kiel moderna,
Tiel taŭga por la junaj kiel por la maljunaj,
Tiel loka kiel universala kaj
Tiel monda kiel super-monda.

La mesaĝo de la Budho estas vere La Lumo por la
Homaro, la ESPERO por la MONDO.

PACON AL ĈIUJ ESTAĴOJ!